HUNGARA FERVOJISTA MONDO

Esperanto, Internacia lingvo

Arbara provinca fervojo en la „Bükki” Nacia Parko

1
---------- 61-a jarkolekto
2017

HUNGARA FERVOJISTA MONDO
Revuo de la Fervojista Esperanto-Movado en Hungario
Fondita de D-ro István Bácskai en la jaro 1957.

Respondeca redaktoro:
István Gulyás
Eldonas:
Hungara Fervojista Esperanto-Asocio
Hungara Sekcio
de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio
Poŝta adreso: HU-1155 Budapest
Rákos út 98. I/9.
Aperas kvaronjare
Abonprezo: al hungara adreso: HUF 2000
al eksterlanda adreso: EUR 12
*

MAGYAR VASUTAS VILÁG
A magyar eszperantista vasutasok központi lapja
Felelős szerkesztő: Gulyás István
Kiadásért felelős
A Magyar Vasutas Eszperantó Egyesület
„Szkenguru" Nyomda Budapest
Felelős vezető: Balla László

ISSN 0230-323x

ENHAVTABELO:

2. I. Gulyás: Nia fakrevuo

3. I. Gulyás: Jarfinaj pensoj

4. I. Gulyás: Zamenhof memorfesto en Nyíregyháza

5. J. Tomísek: El fervoja mondo

7. J. Halász: La aventurparko Zemplén

11. HFEA: Nekrologo **(**Pál Hepp**)**

12. Gy. Gaál: Aŭtuna ekskurso al Pollando

14. I. Gulyás: Naciaj parkoj en Hungario

NIA FAKREVUO

En la nuna numero de nia fakrevuo ni trovas kelkajn interesajn artikolojn, kiuj nur parte kroĉiĝas kun la fervojo kaj kun la fervojista vivo. Mi pensas, ke la artikolo pri la naciaj parkoj en Hungario estas interesa kaj aktuala temo, pro tio mi dediĉis iomete grandan spacon por ĝi. Pere de tiu ĉi artikolo ni povos ekkoni preskaŭ ĉiujn partojn de Hungario, kaj konstati, ke nia lando enhavas altvalorajn kaj belegajn regionojn.
La aliaj temoj estas la ekskursoj al la suda parto de Pollando, kaj al la montaro Zemplén, kiu troveblas en la nordorienta parto de Hungario. Legante la artikolojn ni sentas deziron fari similajn ekskursojn por ekkoni nian patrujon kaj aliajn landojn, promenadi en nekonataj kolonioj kaj malnovaj urbopartoj, vagadi en arbaroj kaj herbokampoj, flosi kaj ŝipiradi sur riveroj, grimpi montojn, spiri puran aeron, forlasi malgajajn pensojn kaj ĝui la vivon.
Interesa kaj ĝuplena estis la Zamenhof-memorfesto en Nyíregyháza, ĉefe la prelego pri la nova programo „Jaro de lernanto", kaj la parolado de István Nemere. Mi konstatis, ke la homo lernas ĝis la tago de sia morto, ĉar mi aŭdis pri multaj novaĵoj kaj interesaĵoj.
Fine la vera fervojtemo estas la artikolo „El fervoja mondo", kiu prezentas al ni kelkajn novaĵojn el aliaj fervojoj.

Mi deziras bonan legadon kaj samajn sentojn, kiujn mi spertis dum la pretigo kaj legado de la artikoloj.

István Gulyás

JARFINAJ PENSOJ

Laŭ la poeto Villon la jaroj flugas kiel la minutoj, la hungara kanto tion diras, ke la tempo kuregas, nun mi povas konstati, ke mi ne povas marŝi samtakte kun la tempo. Mi sentas min tiel, kiel oni forrabas kaj plenŝtopas min en aŭtomobilon, kaj tiu rapidegas al iu nekonata celo. Do denove estas ĉi tie la nova jaro malgraŭ tio, ke mi sentas, ke la jaro 2016 antaŭ „kelkaj" monatoj komenciĝis.

Trapasante la sojlon de la nova jaro ne estas inda voti, sed estas inda mediti pri la vivo, pri niaj farendaĵoj. Povas helpi en tiu medito la sekva saĝa proverbo: „Lernu el la pasinteco, vivu en la nuntempo, kaj esperu el la estonteco!" Tiuj vortoj estas simplaj, tamen estas multsignifaj, kiuj instruas nin konvene vivi. Ni devas ekzameni nian agadon sur la tereno de la Esperanto-movado, eĉ en nia propra vivo, kaj ni devas tiri el tiuj agadoj la instruon. Ĉar el la tempo pasinta ni ĉerpas instruon por la tempo venonta.

En la komenco de marto okazos nia ĝenerala kunsido, kie ni taksos nian pasintjaran agadon, la efektivigon de niaj entreprenitaj taskoj, la mastrumadon kaj aliaj devigitecojn, kaj ni difinos la ĉi-jarajn taskojn kaj farendaĵojn. Mi kuraĝas esperi, ke nia laboro en la jaro 2016 estis iomete efika kaj utila. Tamen mi pensas, ke ni devas antaŭeniri sur la tereno de la lingvoinstruado kaj la varbado de novaj membroj, ĉefe gejunuloj. Nia laborplano ĉiujare enhavas tiujn taskojn, sed efektivigi tiujn estas malfacila. Multaj membroj diras, ke „mi ne havas tempon" por lerni la lingvon, kaj la varbado estas preskaŭ vane.

Tiu tempo estas malfacila periodo en la vivo de la hungaraj fervojistaj esperantistoj. La angla lingvo rikoltas la laŭrojn, la reorganizacio de la fervojo ne helpas al nia movado, la apogo de VOKE progresive malkreskas, la entuziasmaj fervojistaj esperantistoj maljuniĝas kaj ili jam ne povas partopreni en nia laboro, multaj laboremaj maljunaj fervojistaj esperantistoj mortis ktp. La esperantistoj – ne nur la fervojistoj – ege ŝatas ekskursi kaj ĝui la kulturajn programojn dum la kongresoj kaj ceteraj kunvenoj, sed la movadaj laboroj restas por kelkaj entuziasmaj esperantistoj. Mi scias, ke ni ĉiuj bezonas la diversajn programerojn, ja ekkoni aliajn landojn, popolojn, kulturojn, morojn k.a. estas neforgesebla travivaĵo, sed tamen – laŭ mia opinio - nur la komuna laboro sur la tereno de la Esperanto-movado povas doni ĝojplenajn rezultojn.

Mi ne volas plendi, sed ni devas serĉi kaj trovi la ĝustan vojon en nia movado. Ni esperu, ke la sekva jaro alportos la plibonigon, kaj ni havu fidon pri la futuro! En la sekva numero de nia faka revuo HFM mi detale raportos pri nia ĝenerala kunsido, kaj mi esperas, ke – laŭ la jarraportoj de niaj fakgrupoj kaj membroasocioj – mi povos pli rozkoloran bildon pentri pri nia agado.

István Gulyás

ZAMENHOF MEMORFESTO EN NYÍREGYHÁZA

Por mi estis granda ĝojo kaj honoro, ke la „Verda Stelo” Esperanto Societo en Nyíregyháza invitis min partopreni en la ĉi-jara Zamenhof-memorfesto. Jam estas tradicio, ke ĉi tiu societo organizas ĉiujare tiun aranĝon, kiu okazis la 10-an de decembro en la fervojista kulturdomo. La gastoj venis el Budapest, Debrecen kaj Miskolc, kaj kune kun la lokaj esperantistoj entute partoprenis 30 personoj en la memorfesto.

Partoprenantoj de la memorfesto

La ĉeestantojn salutis Miklós Zuberecz prezidanto de la societo, kaj mallonge li resumis la plej gravajn eventojn kaj rezultojn de la pasinta jaro. Laŭ tio la societo agadis rezultohave kaj sukcese, kaj multaj membroj de la societo partoprenis diversajn aranĝaĵojn kaj enlande kaj eksterlande. Li aparte menciis la 101-an Universalan Kongreson, kiu okazis en la slovaka urbo Nitra, kaj la ILEI-Konferencon, kiu okazis en Nyíregyháza, kaj organizis ĝin mem la „Verda Stelo” societo.
Sekve la raporton Győző Gaál deklamis poemon.
Poste Enikő Zengő Sereghyné prezentis la invitatajn gastojn de la aranĝaĵo, s-ron Stefan MacGill, la vicprezidanto de UEA, s-ron István Nemere verkisto, kaj min, la prezidanto de la Hungara Fervojista Esperanto-Asocio. Poste ŝi raportis pri la prepar- kaj dumkonferencaj laboroj de la 49-a ILEI-Konferenco, kiu bone sukcesis, kaj donis rekonon kaj reputacion de la „Verda Stelo” societo. Ŝi dankis la laboron de la membroj de LKK, kaj al ĉiuj helpantoj.
Stefan MacGill en sia festparolo rememoris pri la naskiĝtago de Zamenhof, parolis pri la jaro 2017, kiu estas la „Jaro de Zamenhof”, kaj poste per lumbildoj prezentis la programon „Jaro de la lernanto”. Laŭ tiu prezentado ni estis konvinkita, ke tiu nova

programo sukcese akcelos la lernadon de Esperanto, kaj helpas la varbadon ĉefe inter la gejunuloj por Esperanto.

Stefan MacGill festparolas

Sekvis la parolado de István Nemere, kiu parolis pri sia verkista aktiveco, kaj li akcentis, ke la Esperanto havas grandan rolon en ĝi. Li verkis pli ol 670 verkojn, el kiuj 30 romanoj aperis ankaŭ en Esperanto. Li analizis la kriteriojn de la validiĝo de la internacia lingvo. Laŭ tio la lingvo estu simpla kaj facile ellernebla, la skribo kaj la elparolo estu sama, fine la lingvo estu unueca kaj ne havu dialektikon. La angla lingvo tute ne havas tiujn kriteriojn, tamen ĝi estas la plej disvastiĝita lingvo. La lingvo Esperanto povus helpi por la aliformo de tiu tendenco, ĉar ĝi estas genia lingvo kun nenombreblaj avantaĝoj.

Post tiu interesa „lingvoscienca" prelegado mi laŭtlegis mian salutleteron al la memorfesto, en kiu mi akcentis la valorajn aktivecojn de la membraro de la societo, kaj mi alvokis la atenton pri la ĉijaraj eventoj. Poste mi mallonge parolis pri la agadoj de UEA kaj IFEF.

Fine Enikő Zengő Sereghyné per lumbildoj prezentis la okazintaĵojn dum la 49-a ILEI-Konferenco. Ŝi krome diris al ĉiuj bildoj interesajn rimarkojn, per kiuj la ĉeestantoj sentis la ĉeeston dum la konferenco.

La memorfesto finiĝis kun libera babilado, kaj ĉefe (!) bongusta tagmanĝeto kun multspecaj bakaĵoj kaj trinkaĵoj.

La memorfeston profesie kaj zorgeme organizis la „Verda Stelo" Societo, kion mi ege ĝuis, kaj mi denove dankas la inviton al tiu festkunveno.

István Gulyás

EL FERVOJA MONDO

Aŭstrio: **ÖBB plivastigas reton de noktaj kunligoj**

Aŭstraj Federaciaj Fervojoj (*ÖBB*) ekde nova horaro, kiu komencos validi en decembro 2016, plinombrigos reton de noktaj trajnkursoj. Tiucele estis anoncita elektotraktado por aĉeto de 60 uzitaj lit- kaj kuŝvagonoj, kiel ankaŭ 15 vagonoj por transporto de pasaĝeraŭtomobiloj. Supozata investo atingas 31 milionojn da E ŭroj. *ÖBB* krome deziras en sekvaj tri jaroj alikonstrui 20 pasaĝervagonojn al kuŝvagonoj, kaj en plia horizonto planas anonci elektotraktadon por aĉeto de vagonoj de nova generacio por noktaj trajnoj, kiuj estu entrafikigataj inter Aŭstrio kaj Italio.

Aŭstrio: **Aŭtobusoj de *ÖBB* nomiĝas "*Hello*"**

Sub nomindiko „*Hello*" kaj reklamdevizo „*ÖBB on the Road*" en somero 2016 ektrafikis 28 aŭtobusoj *Mercedes* de Aŭstraj Federaciaj Fervojoj (*ÖBB)* sur internaciaj buslinioj el Vieno al Berlino, Frankfurto ĉe Majno, *Genova,* Strasburgo, Venecio kaj Zagrebo, el Munkeno al Venecio, el Insbruko al Zuriko, kaj el Prago al Venecio. Laŭ oferto okazas unu ĝis kvar kunligoj en tago, iuj eĉ kiel noktaj kunligoj. Cele akiri pliajn liniojn oni pripensas kunlaboron kun „*Berlinlinienbus",* kiu apartenas al Germana Fervojo *DB.*

Ĉeĥio: **Trafikaj projektoj en Ĉeĥio**

Ĉeĥa registaro 24-an de oktobro 2016 aprobis leĝproponon de Ŝtata fonduso por infrastrukturo por la jaro 2017. Laŭ buĝeto por trafikaj projektoj estas destinitaj pli ol 80 miliardoj da kronoj (ĉirkaŭ 20 milionoj da eŭroj). Krom financado de ĉefŝoseaj konstruaĵoj estas enkalkulitaj investoj por fervojo, ekzemple plu daŭros modernigo de fervoja linio *Rokycany – Plzeň,* modernigo de fervojaj stacioj *Ostrava-Vítkovice* kaj *Olomouc,* aŭ rekonstruo de surtegmentigo de stacidoma halo en *Praha hlavní nádraží.* Al nove komencataj projektoj sur fervojo apartenas ekzemple optimumigo de fervojlinio *Český Těšín – Dětmarovice* kaj rekonstruo de kajoj kun senobstaklaj aliroj en fervojstacio *Poříčan*y.

Germanio: **En Germanio komencos trafiki trajnoj movataj de hidrogeno**

Ankoraŭ antaŭ fino de la jaro 2016 komencos trafiki sur antaŭrbaj linioj en Germanio unuaj 14 motorvagonoj movataj de hidrogeno. Tiun ĉi novaĵon kun nomo *"iLint"*, en kiu dizelpetrolon anstataŭos hidrogeno, prezentis Germana Fervojo *Deutsche Bahn* en antaŭneloge okazinta foiro *InnoTrans* en Berlino. „La nova tekniko ofertas realan alternativon al dizelo", akcentis federacia ministro de trafiko *Alexander Dobrindt (CSU)*. Trajnoj kun hidrogentrakcio, kiuj trafikos per rapido ĝis 140 km/h, estas konsiderinde malpli bruaj, sen elpuŝataj malpurigaĵoj, povume kaj koste pli favoraj, atentigis la ministro *Dobrindt.* Rezervujoj por hidrogeno estas lokitaj sur tegmento de la vagonoj, kaj post provizado eblas trakcii 600 ĝis 800 km. Problemo ĝis nun estas, ke je dispono estas nur malmultaj provizad-stacioj, la konzerno *Alstom* tamen jam devoligis sin laŭlonge de la fervojlinioj baldaŭ konstrui tiujn. *Dobrindt* plu postulas por evoluigo de la trafiko *„iLint"* ok milionojn da eŭroj, kaj pliajn kvar milionojn ricevos liverinto, la konzerno *Bombardier*, anoncis la germana ĵurnalo *Welt.*

Pollando: **Polaj marhavenoj tendencas**

Pola ekspluatanto de fervoja infrastrukturo, ŝtata kompanio *PKP PLK,* deziras investi 600 milionojn da zlotoj (ĉirkaŭ 150 milionojn da eŭroj) por modernigi fervojan alligon de baltmaraj havenoj *Szczecin* kaj *Swinoujście.* Estos konstruataj 160 km da novaj trakoj, du viaduktoj kaj unu ponto. La fervojlinio estos elektrizita kaj ekipita de moderna sekurecinstalaĵo. Temas pri unu el partoj de la programo por 4 milionoj da zlotoj, kiu plibonigu alligon de ankaŭ aliaj baltmaraj havenoj Gdansko kaj *Gdynia.*
Nuntempa trafikokvoto de fervojo en transporto el havenoj *Szczecin* kaj *Swinoujście* estas ĉirkaŭ 46%. Granda parto de la programo povas esti financata el programo de EU "*Connecting Europe".* Modernigo povus finiĝi antaŭ jaro 2020, per tio povus esti pligrandigata signifo de la polaj baltmaraj havenoj por internacia fervoja trafiko.

Portugalio: **Nova nomo por *CP Carga***

Vartrafika filio de la kompanio Portugalaj Fervojoj, *CP Carga,* estis en la jaro 2016 transprenita de granda ŝipkompanio kun sidejo en Ĝenevo "*Mediteranean Shipping company (MSC)*". La kompanio tiel nove nomiĝas "*Medlog – Transportea Logistica", MSC Medlog* tiel fariĝis la plej granda fervoja vartrafikisto en Iberio, kaj iom post iom disvastigas sian aktivadon ankaŭ en aliaj landoj. Por transportoj en Hispanio estis de la firmao *Alpha Trains* pruntepreniataj 4 dizellokomotivoj tipo *Euro 4000*, kiuj povas garantii trafikon de trajnoj ĝis klientaj trakoj de celloko en Hispanio.

Preparis: **Jindřich Tomíšek**
Reviziis: **Heinz Hoffmann**

LA AVENTURPARKO *ZEMPLÉN*

(Unua parto)

Legante la titolon de ĉi tiu artikolo la leganto verŝajne demandas kial okupiĝas tiu fervoja fakrevuo pri temo de iu turisma vidindaĵo. La klarigo estas simpla. Laŭ la hungara fervoja fakliteraturo ankaŭ la telferoj apartenas al la fervojoj. Ilia loko troviĝas inter la specialaj fervojoj. En ĉi tiu aventurparko la vizitanto povas renkontiĝi kun diversaj tipoj de telferoj. Inter ili estas kiu plej longa en nia lando, aliaj estas vere unikaj. Eĉ ankaŭ la bobvego estas rigardebla trudvoja trafikilo. Do, en certa rilato ĉi tiu artikolo ligiĝas al fervoja temo.

Sátoraljaújhely estas norda urbo de Hungario. (Nur inter krampoj ni mencias ĉi tiu urbo estis la loko de la Landa Amika Fervojista Renkontiĝo en 1992). Ĝi estas centro de la *Zemplén*-a pejzaĝo, sidejo de la historia departemento *Zemplén* kiu feliĉe konservis siajn puran aeron kaj naturan ĉirkaŭaĵon. La montoj altiĝantaj super ĝi estas vulkandevenaj, kies formojn la vizitantoj ofte similigas al tiu de la Italia Vezuvo. La urbocentro ĝis nun konservis karakteran humoron de la Altlandaj urbetoj. Post la unua mondmilito laŭ la packontrakto la urbo estis distranĉita de la landlimo je du partoj. La malgranda parto nun apartenas al Slovakio. La hungaran urboparton inter la du mondmilitoj oni menciis ankaŭ Trunkita *Sátoraljaújhely.*
Plej grava investado de la urbo kaj ĝia regiono estas la Aventurparko *Zemplén,* kiu nun jam entenas 9 tute novajn atrakciojn, multe da novaj konstruaĵoj kaj vojoj. La investaĵo realiĝis parte el financaj fontoj de Eŭropa Unio, parte el propraj fontoj de la urba kosilantaro. La unua elemento de la Aventura Parko estis la bobvego, kiu ekfunkciis la 20-an de julio 2009.
La Aventurparkon - kiu troviĝas sur 514 m-oj alta monto, nomita *Magas hegy* (Alta monto) - ni prezentas irante de malsupro al supro de la monto.

Malsupra stacio:

1. Seĝa telfero (*libegő*)

La plej longa seĝa telfero en Hungario

En Hungario pri la plej longa seĝa telfero povas fieri urbo *Sátoraljaújhely*. Longo de la telfero estas 1332 m, kiu inter 250 – 480 m alto super la marnivelo kapablas transporti per 99 lift-seĝoj samtempe ĉirkaŭ 200 pasaĝerojn. Tipo de la telfero estas unukabla karusela (kun rondira kablo). Ĝia plej granda alto super la ternivelo estas 14 m-oj. Daŭro de la veturo de la malsupra stacio ĝis la montopinto estas 19 minutoj. La ĉefa enirejo de la Aventurparko *Zemplén* troviĝas ĉe la meza stacio de la seĝa telfero, kaj ĉe la supra stacio estas novkonstruita pluretaĝa belvidejo, el kiu oni povas admiri la urbon kaj ĝian ĉirkaŭaĵon.

2. Bobvego

Veturo sur la bobvego

Ankaŭ la plej longa bobvego de nia lando troviĝas ĉi tie. Ĝia longo estas 2275 m-oj. La malsuprenglito estas absolute sekura, la bobo estas fiksita al kvar tuboj. Ĉiu pasaĝero memstare kondukas sian bobon, kiu ĉe rapido 37 km/h aŭtomate bremsiĝas, garantiante tiel maniere la sekurecon de la glito. La kondiĉoj, ĉirkaŭaĵo, kaj beleco de la vego donas neforgeseblajn travivaĵojn por ŝatantoj de la rapidego.

3. Kampo por sketado kaj rulsketado

La kampo por sketado kaj rulsketado estis inaŭgurita la 9-an de julio 2012. Provizore ĝis fino de oktobro 2016 la kampo estis fermita pro rekonstruaj laboroj. Post fino de la rekonstruado ĝi iĝis kovrita sportejo kaj aranĝocentro. La 1500 kvadratmetra sportejo en la printempa, somera sezonoj funkcias kiel kampo por rulsketado, sed post alveno de la malvarma vetero ĝi estas konvena por artefarita sketkampo kaj ejo por glacihokeo.
Kiu ne havas proprajn sketilojn tiu povas elekti el la plej modernaj tipoj en la pruntejo. Eblas pruntepreni ankaŭ hokebastonon, sketkaskon, kaj korpoŝirman vestaĵon. Se viaj sketiloj eluziĝis, tie vi trovas eblecon akrigi iliajn eĝojn.

4. Grimpomuro

La surfaco de la grimpomuro entute estas 400 m^2. Ĉi tie troviĝas en Hungario la plej alta en Mez-Eŭropo unu el la plej altaj enkonstruaĵa grimpomuro. La alto en la konstruaĵo estas 18 metroj, ekstere ĝi estas 20 metroj.

Kovrita sportejo por sketantoj

La ĉefa vidpunkto ĉe formado de la vojoj estis ke trovu por si konvenan mursurfacon infanoj, komencantoj kaj ankaŭ profesiuloj. Dank' al tio - de ĉirkaŭ IV minuso por la tute komencantoj ĝis X minuso kiu estas rigardebla por la ne tre spertaj grimpuloj tro malfalfacila - oni povas grimpi vojojn el iu ajn parto de la skalo, entute 25 – 30, inter ili ankaŭ negativajn. Sekve de tio, jam nur la kreiveco de la uzantoj limigas la senfinajn forneto, kuirplato. Oni povas rezervi peplomojn, kombinaĵojn.

Pli ol 2000 individue projektitaj kaj produktitaj hungaraj prenoj „*T-Rock*" troviĝas sur la muro, kiun en ĉiu detalo oni konstruis laŭ internaciaj normoj kaj laŭ tiuj de Eŭropa Unio.

Ĝia ekipiteco havas internacian kvaliton. La grimpvojojn muntitajn sur la muron oni konstruis per helpo de monto- kaj rokgrimpantoj kiuj havis plurjardekajn fakajn spertojn.

La sekurigajn ekipaĵojn, mem la Aventurparko *Zemplén* disponigas, pro la nediskutebla responso. Pro la pli sekura grimpado memkompreneble muromajstro inspektas la grimpantojn. Krom la kunŝnura grimpado ricevis lokon ankaŭ la *„boulder”*. La signifo de *„boulder”* estas ŝtonbloko. Ĉi tiu estas gravita grimpado sen sekurigo en malgranda alto. La tasko estas libere grimpi per eltrovitaj movoj 3 – 4 metrajn altojn. La hazarde falintajn grimpantojn defendas kontraŭ la vundiĝo dikaj gimnastikaj matracoj metitaj sur la plankon. Pro la malgranda alto la grimpantoj ne povas fali tiel ke ili grave vundiĝu.

Bravulo sur la grimpomuro

Estas intenco, ke dum la liberaj tempoj uzu la muron ankaŭ lernejaj grupoj en kadro de gimnastikaj studhoroj. La grimpado estas bonefika ankaŭ por la infanoj. Ĝi servas inter aliaj plibonigon de teniĝaj problemoj, plibonigon de ekvilibraj kaj kunordigaj kapabloj, plilongigon kaj elastecon de muskoloj, evoluigi la kapablon de problemosolvo kaj kreiveco.

1. Turisma hotelo

Ene de muroj de la grimpomura centro troviĝas turisma hotelo kun 60 individuaj lokoj, per kies inaŭguro realiĝis malnova revo de la vizitantoj. En la vintra sezono aperis pli kaj pli granda bezono por tranoktadejo proksime al la skitereno kun modestaj prezoj, ankaŭ somere multaj ekskursantoj, lernejaj klasoj, amikaj rondoj aŭ familioj deziris ricevi lokon proksime al la travivaĵ-elementoj.

En la turisma hotelo troviĝas unu dulita, unu trilita, du kvarlita, unu kvinlita, kaj unu dekunulita ĉambroj. Sur la teraso estas bivako-tranoktadejo por 19 personoj.

Al ĉiu ĉambro apatenas dupersona galerio unu tablo kun seĝoj, fermebla ŝranko kaj manlavujo. La banejo kaj kuirejo estas komunaj kaj ili troviĝas sur la koridoro. Ekipaĵoj en la kuirejo estas kafaparato, fridujo, mikroonda kusenojn, litaĵojn, laŭ bezono aermatracojn, kaj tendojn.

Skivego somere

Meza stacio:

1. Aventuraj ekskursvegoj

En la Aventurparko la vizitantajn infanojn kaj plenkreskulojn atendas kvar diversgradaj aventuraj ekskursvegoj. Ĉe fino de la vego 100 m-ojn longa kablovoja deglitejo

„*CANOPY"* kaj malgranda kvar-dimensia grimpomuro faras pli memorinda la aventuran ekskurson.

En la Aventurparko troviĝas unu instrua, unu porinfana (verda) kaj tri porplenkreskulaj (blua, ruĝa kja nigra) vegoj. La instrua kaj porinfana vegoj estas tute apartaj (ili havas proprajn starto- kaj alvenlokojn), la porplenkreskulaj vegoj ekiras el sama punkto, kaj alvenas en saman punkton. Sur la instrua vego la ekskursgvidantoj instruas la ĝustan uzon de la ekipaĵoj kaj apliki la sekurigajn regulojn preskribitajn por la vego. La vegojn ĉiu memstare laŭiras, la ekskursgvidanto sur la tero akompanas, inspektas, atentigas kaj helpas la gastojn, laŭbezone fakece savas ilin.

La infanoj sekure de 110 centimetra alto povas partopreni la ekskursojn (verda vego), la porplenkreskulajn vegojn oni povas uzi de 150 centimetra alto (blua, ruĝa kaj nigra vegoj). Ĝenerale por po unu vego la laŭira tempodaŭro estas 40 – 60 minutoj.

1. Skivegoj

Skivego vintre

En la Aventurparko *Zemplén,* jam tri skivegoj atendas la gastojn, dezirantajn sporti. Unu el ili estas uzebla dum la tuta jaro, ĉi tiu estas la plej longa kaj plej larĝa skivego de nia lando. La skiadon dum kvar sezonoj ebligas kovraĵo, t.n. *„NEVEPLAST"*, kiu kovras la tutan surfacon de la skivego. *„NEVEPLAST"* apartenas al plej modernaj kovraĵtipoj, kiu ne difektigas la skiekipaĵojn, kaj estas absolute medioamika.

La 21-an de januaro 2012 estis inaŭgurita la dua vego, al kiu per helpo de 8 neĝpretigiloj oni povas „produkti" neĝon post alveno de la malvarma vetero. Ĉi tiu vego estas 600 m-ojn longa kaj konsistas el nigra,ruĝa kaj blua etapoj. Apud ĝi skitelfero servas la komforton de la skiantoj.

Ankaŭ la porinfana instruvego havas neĝpretigilojn, kaj apud ĝi troviĝas skitelfero por infanoj.

Kompletigaj servoj estas: skipruntejo kaj skilernejo.

Sur la trogvojo

2. Trogvojoj *(„TUBBY")*

La uzo de 3x60 metraj kurboriĉaj trogvojoj *(„TUBBY")* bezonas neniun scion, tamen sekurece povas turbi, rotacii laŭ ili kaj infanoj kaj plenkreskuloj. La supreniron antaŭ gliti malsupren pli faciligas „sorĉa tapiŝo" t.e. rultrotuaro.

3. Ludparko

Por vizitantoj alvenantaj kun neplenaĝaj infanoj oni konstruis familiamike ludparkon konvenan al normoj

kaj pretendoj de EU kiu enhavas plej parte naturajn konstrumaterialojn.

2. Lernopado

La Aventurparko akceptas ne nur ŝatantojn de la ekstremaj travivaĵoj. Oni atendas ankaŭ naturamikojn kaj ekskursantojn. Ilian malstreĉiĝon sevas lernopado enhavanta 15 staciojn, kiuj prezentas fieraĵon de la regiono, la mirindajn flaŭron kaj faŭnon, terhistoriajn kaj geologiajn interesaĵojn, historiajn kaj literaturajn valorojn de regiono *Zemplén*.

3. Skimuzeo

La Skimuzeo, estigita en la malnova skidomo estas unika establaĵo, kiu estas sola muzeo pri historio de la skiado en nia lando.

4. Kompletigaj servoj:

- konferenco-salono
- bufedo kun subĉiela teraso, ofertanta kuiraĵojn kaj malvarmajn manĝaĵojn
- vestoŝanĝejo kaj duŝejo por viroj kaj virinoj
- senobstakla konstruaĵo
- lifto servanta movhandikapulojn
- ludparko kaj sledvego konstruitaj laŭ normoj de EU
- parkejo

En la Aventurparko *Zemplén* oni ofertas eblecojn por klasekskusoj, libertempaj programoj de laborlokaj grupoj, aŭ teamkonstruaj trejnadoj.

(Daŭrigota) **D-ro József Halász**

PÁL HEPP

(29.01.1935 – 09.12.2016)

La 9-an de decembro 2016 mortis Pál Hepp en sia 82-a jaraĝo. Li naskiĝis la 29-an de januaro en la jaro 1935 en vilaĝo Napkor. Li lernis kaj ricevis abiturientan diplomon en la Gimnazio de Nyíregyháza. Poste li akiris inĝenieran diplomon.

Li komencis sian fervojistan deĵoron en la jaro 1958 en Záhony, kaj post kelkaj jaroj oni alilokis lin al Debrecen. Dum sia tuta vivo restis fidela al la fervojo, ja li laboris en multaj terenoj kaj postenoj de la Hungaraj Ŝtatfervojoj. Li pensiiĝis el la Fervojdirekcio de Debrecen kiel vicfakestro en 2001.

Li loĝis en Nyíregyháza, kaj ekde 1976 en Debrecen, kaj kiam li iĝis pensiulo li translokiĝis al Bocskaikert.

Lia Esperanto-aktiveco estis longa kaj ekzemplodona. Ekde 1978 li estis esperantisto, kaj membro de la Debrecena Fakgrupo de la Hungara Fervojista Esperanto-Asocio. Post la morto de József Mátyás en 1995 li transprenis la gvidan postenon, kaj dum du jardekoj gvidis li tiun fakgrupon en Debrecen. Li estis entuziasma adepto de la internacia lingvo. Li partoprenis en multaj kongresoj kaj renkontiĝoj kaj enlande kaj eksterlande. Li prelegis multfoje en la Esperanto-klubo, eĉ instruis la komencantojn, kaj altruiste helpis la membrojn de la fakgrupo. Li bone kunlaboris kun la Hajdu-Bihar Departementa Esperanto Organizaĵo.

Lia familio, parencoj, geamikoj, konatuloj kaj ni esperantistoj funebras, kaj konservas lin en niaj memoroj.

Kara Pali, ripozu en Paco! **HUNGARA FERVOJISTA ESPERANTO-ASOCIO**

AŬTUNA EKSKURSO AL POLLANDO

Inter la 25-an kaj 28-an de septembro 2016 mi faris kvartagan ekskurson en Pollando kune kun geesperantistoj el la Esperanto Asocio Tata. La ekskurs-estro estis *József Trinka*, la ĉiĉerono kaj interpretisto (se estis bezonata) mi estis *(Győző Gaál).*

La ĉefplaco en Krakovo

En la unua tago ni frumatene startis el urbo *Tata* per buseto al Pollando por malkovri vidindaĵojn, historiajn monumen-tojn, nian komunan historion. Nia tranok-tejo estis en pola urbeto *Myslenice,* kiu distancas 30 kilomet-rojn de la belega urbo Krakovo. Ni alvenis posttagmeze al la hotelo „Marina" de la urbeto, kie ni tranoktis dum tri noktoj. Post mallonga ripozo ni veturis al Krakovo, kiu estis iama ĉefurbo de Pollando ĝis la jaro 1609. Ni vizitis la reĝan kastelon kaj la katedralon en *Wawel*. Oni diras, ke Krakovo estas „Salono de Eŭropo", kaj „Perlo de Pollando". Ni spertis la verecon de tiuj sloganoj. En la katedralo ni rigardis la sarkofagon de la iama transilvana kaj poste pola reĝo *István Báthori*. Antaŭ la alia marmora sarkofago ni haltis, kaj memoris pri la reĝino *Hedviga*, kiu estis filino de la hungara reĝo Ludoviko la Granda. La sarkofagoj estas skulptitaj el ruĝaj kaj blankaj marmoroj, kaj estas mirindaj kun la arkitekturo de la katedralo, kiu estas panteono de polaj famuloj.

En la dua tago ni veturis al la loko de la iama koncentrejo *Auschwitz*. Tie la nazioj ekzekutis ĉirkaŭ 450 milojn da hungaraj judoj. Oni neniigis entute en Pollando (Majdanek, Stutowo ktp) 4,5 milionojn da homoj. Ĉe la enirejo estas skribita slogeno: „La laboro liberigas vin" („Die arbeit macht frei"). Ĉiu nacio havas propran blokon por memoro. Post tiu malgaja vizito ni daŭrigis nian ekskurson al la naskiĝloko de la iama papo Johano Paŭlo la dua (1920-2005). En ĝi nun estas muzeo, kiu montras la vivon de la papo ekde la naskiĝo ĝis la morto per multaj fotoj kaj dokumentoj. En la ĉefplaco estas sukeraĵejo, kie ni bongustis „Kremaĵon de papo". La lasta stacio de nia ekskurso estis la pilgrimejo *„Kalwarija Zebrzydowska"*. La barokstila katedralo gardas la faman ikonon de „Nigra Madono". La pilgrimantoj ĉiujare pilgrimadas kelkfoje al tiu pilgrimejo. Tiu loko estas kultura monda heredaĵo de Unesko. Lastfoje la papo Johano Paŭlo la dua vizitis ĝin en 2005. Dumvoje al nia hotelo ni denove vizitis kelkajn vidindaĵojn en Krakovo, kiel la ĉefplaco kun la „Maria-preĝejo" kaj la „Drapohalo" *(Sukiennice).* La humoro de la belega arkitekturo de la urbo estas mirinda, kaj ni sentis nin en la mezepoko.

La tria tago estis sabato, kiam ni ekskursis al la montaro kaj nacia parko *„Pieniny".* En la vilaĝo *Debno* ni admiris la lignopreĝejon de „Sankta Michaelo", kiu estis konstruita en la

15-a jarcento. Okaze de la konstrulaboro de tiu ĉi preĝejo oni ne uzis feronajlojn nur tenonojn. La preĝejo estas ekde 1991 kulturaj mondaj heredaĵoj de Unesko. Dumvoje ni haltis ĉe la fortikaĵo *„Nedec" (Niedzica)*. La fortikaĵon konstruigis en gotika stilo la hungara princo *Géza* en la jaro 1325, poste posedis ĝin la familio *Zápolya*, poste la familio *Pálóczy Horváth*, kaj fine la familio *Salamon*. Post la dua mondmilito la fortikaĵon posedis la pola ŝtato. Poste ni daŭrigis nian ekskurson en la nacia parko, kaj sekvis la plej atendata parto de la ekskurso, la flosado sur la rivero *Dunajec*. Ni startis el la loko *„Sromowce Wiznie",* kaj post tri horoj ni alvenis al la finstacio de la flosado *„Szczawnica".* Dum nia flosado ni rigardis belajn kreskaĵojn, florojn, rokojn kaj rarajn birdojn. Tiu flosado estis mirinda, ni faris multajn fotojn, per kiuj ni neniam forgesis tion. Poste ni vizitis la mondfaman salminejon en *Wieliczka*. Ni malsupreniris sur 787 ŝtupoj, gvidante de pola ministo, kiu estis nia ĉiĉerono, kaj kiu donis informojn pri la vidindaĵoj kaj pri la historio de la salminejo. Ekde 1000 jaroj oni minis ĉi tie salon, kies nomo estis en la mezepoko *„Magnus Sal".* Kiam la pola reĝo *„Pudora Boleslavo"* edziniĝis kun la filino *„Kinga"* de la hungara reĝo *Béla* la kvara, la reĝo *Boleslavo* invitis el Hungario ministojn, kiuj komencis modernan produkton de la salo. La ĉiĉerono fabelis interesan legendon pri la salminejo. Laŭ tio la reĝfilino *Kinga* ĵetis oran ringon – kiun ŝi ricevis kiel donacon al la geedziĝa festo – en la lagon de salminejo en Transilvanio, kaj tiun ringon trovis la ministoj en *Wieliczka* en la salminejo. Tiu miraklo signifas, ke la ringo migris el Transilvanio al Pollando. En la subteraĵo ni vizitis la „Salonegon *Kinga*", kies longeco estas 55 metroj, larĝeco 14 metroj. En la 19-a jarcento iamaj ministoj skulptis diversajn figurojn el salo, kiuj ornamas la muron de la salonego. Ni vidis i.a. la skulptitan skulptaĵ-grupon „La lasta vespermanĝo", ĉe la enirejo grandan sal-statuon de la papo Johano Paŭlo la dua, multajn maŝinojn el la 19-a jarcento, interesajn salkristalojn ktp. Vespere en la hotelo atendis nin surprizo, ĉar vizitis nin pola geedza paro, kiu venis el la urbo „*Stary Sacz".* Ili estas geamikoj de *József Trinka*. Post la vespermanĝo ni longe babiladis pri nia komuna historio, movado. Tiu evento montras, ke la amikeco inter hungaroj kaj poloj estas daŭrigata. Pri la legendaj amikecoj poemo skribas: „Kaj la polo kaj hungaro ĉiam estas frata, kune batalas kaj vinon trinkas, heroa kaj brava ambaŭ estas, estu beno ĉiam por ili".

Flosado sur la rivero Dunajec

En la lasta tago ni adiaŭis de la ĉarma hotelestrino, kiu servis al ni bongustajn maten- kaj vespermanĝojn. Ni hejmenveturis, kaj dumvoje ni haltis en la vintra „ĉefurbo" de Pollando, *Zakopane*. Tie ni vizitis la malnovan tombejon de famaj poloj, kaj la ligno-preĝejon, kiun konstruis *S. Witkiewicz* pola arkitektisto. Li estis fondinto de la „goralstilaj domoj", kiuj ricevis la nomon *„zakopana*". Tiuj unuetaĝaj domoj troveblas ne nur en la urbo *Zakopane*, sed en la tutaj vilaĝoj de la pola montaro *Tatra*. La hejmenveturado estis glate, kaj ĉiuj parteprenantoj estis kontentaj, ĉar ni havis multajn neforgeseblajn travivaĵojn.

Győző Gaál

NACIAJ PARKOJ EN HUNGARIO

Nacia parko estas naturrezervejo sub ŝtata protekto. Laŭ la Naturprotekta Mondasocio tiuj parkoj estas teritorioj, kies ekologiajn unuecojn oni devas gardi por la generacioj de la nuntempo kaj estonto. Sur tiuj parkoj oni ne rajtas estigi industriejojn, agrikulturajn establaĵojn, kaj aliajn tiajn faraĵojn, kiuj endanĝerigas la ekvilibron de la ekologio.

En la jaro 1872 en Usono estis fondita la unua nacia parko de la mondo: Nacia Parko Yellowstone. De tiam ekestis pli ol 1600 naciaj parkoj en ĉiuj kontinentoj por konservi kaj protekti la naturajn belecojn, rarajn speciojn aŭ pejzaĝojn. Nuntempe naciaj parkoj protektas ekologiajn procedadojn, kies celo estas sekure gardi la naturon en sia tuto. Bestoj, plantoj kaj pejzaĝoj povu evolui sen ĝena homa influo.

En Eŭropo la unuaj naciaj parkoj - inter ili la Nacia Parko Sarek en Svedio, kaj ankoraŭ ok naciaj parkoj en Svedio - estiĝis la 24-an de majo 1909. Je tiu memoro oni festas la tagon de la Eŭropaj Naciaj Parkoj la 24-an de majo.

En Hungario en la jaro 1973 oni establis la unuan nacian parkon, kiu estas la „Hortobágyi" Nacia Parko. Entute en nia lando ekzistas dek naciaj parkoj: „Hortobágyi" (1973), „Kiskunsági" (1975), „Bükki" (1977), „Aggteleki" (1985), „Fertő-Hanság" (1991), „Duna-Dráva" (1996), „Körös-Maros" (1997), „Balaton-felvidéki" (1997), „Duna-Ipoly" (1997), „Őrségi" (2002) Naciaj Parkoj. La areoj de tiuj naciaj parkoj estas inter 200-810 km^2. La administrado de la naciaj parkoj en Hungario apartenas al la Direkcioj de la Naciaj Parkoj.
En ĉiuj parkoj oni establis vizito-centron, kie la vizitantoj ricevas informojn pri la nacia parko, pri la vizitebleco en la parkoj, pri la naturaj kaj kulturaj heredaĵoj de la regionoj, pri la naturprotektaj aktivecoj, kaj pere de ekspozicioj oni povas ekkoni la flaŭrojn kaj faŭnojn de la naciaj parkoj. En la lastaj jaroj multaj enlandaj kaj eksterlandaj homoj vizitis la naciajn parkojn, kaj anstataŭ la malmultekostaj produktaĵoj kaj memoraĵoj ili aĉetis originalajn kaj lokajn produktaĵojn. La produktantoj estas lokaj loĝantoj, kiuj pretigas kaj kolektas diversajn metiistajn produktaĵojn, nutraĵojn, trinkaĵojn, fungojn, kuracplantojn, mielojn, marmeladojn, fruktojn, fromaĝojn, viandaĵojn ktp.

La naciaj parkoj estas oazoj de la paceco kaj trankvileco. Se iu vizitas nacian parkon dum kelkaj horoj aŭ tagoj, tiu lasas malantaŭ si la bruan urbon kaj la ĉiutagajn zorgojn. La silento de la naturo donas perfektan korpan kaj animan refreŝigon. La dek hungaraj naturaj parkoj donas al ĉiuj homoj tion, kion ili serĉas: pacon, trankvilecon, aventuron, kolorajn travivaĵojn kaj novajn gustojn eĉ agemojn.

„Hortobágyi" Nacia Parko

Hortobágy estas la unua nacia parko en Hungario, samtempe ĝi estas Monda Heredaĵo de Unesko ekde 1999, kiu estas simbolo de Hungario. Ĝi havas 805 km^2 areojn. Sur la blazono de la parko videblas dancanta gruo. La plej karakterizaj specialaĵoj de tiu nacia parko estas la sodteraj stepoj, la leŭsaj dezertoj, la marĉoj, la inundareoj kaj la kuriozaj bestoj kaj birdoj.
Hortobágy estas la plej granda kontinua natura herbejo en Eŭropo, kio signifas, ke ĝi ne estiĝis rezulte de senarbariĝo aŭ riverregulado. Ĝi havas elstarajn

naturajn ecojn, konservante grandan biologian diversecon. Al la teritorio apartenas la t.n. „Tisza-lago”,
en kiu bone trovas lokon akvobirdoj, fiŝkaptistoj, eĉ akvosportistoj. En Hortobágy vivas 342 specoj da birdoj, el kiuj 152 nestas en tiu.
Tiu kulturpejzaĝo enhavas la aktivecon de la paŝtista gento. La paŝtejoj de la malnovaj dombestoj, kiel la grizbovoj, ĉevaloj, porkoj kaj „rackaŝafoj”, gardas la karakteron de la stepo. La centro de la paŝtistoj estas la „Naŭtrua ponto”, kaj la apude troveblaj ĉardo kaj muzeo. Ankaŭ tie estas la vizitocentro, de kie startas la gastoj por malkovri tiun unukan pejzaĝon per tradicia ĉevalĉaro, aŭ per rajdado, aŭ per provinca fervojo, eĉ per biciklo. La vizitantoj ensorĉas la lertecon de la ĉevalistoj, la vidindaĵojn de la galopaj ĉevalaroj, kaj – se la vizitantoj havas bonŝancon – la miraĝon (délibáb), kiam oni vidas tion, kio ne estas tie.

„Kiskunsági” Nacia Parko

Tiun parkon oni fondis en 1974, do ĝi estas la dua nacia parko en Hungario. Tio etendiĝas sur la interspaco de la riveroj Tisza kaj Duna. La plej karakterizaj specialaĵoj de la parko estas la sablomontetoj, la sablaj kaj sodteraj stepoj kaj kelkaj marĉoj. Ĝi havas 568 km^2 areojn. Sur la blazono de tiu ĉi nacia parko videblas sablomonteto.
Tiu parko gardas la memorojn de la multcentjaraj kunvivoj inter la homoj kaj naturoj. La teritorion de tiu parko la Unesko manifestis en 1979 biosfera rezervejo. En la parko troveblas la „Felső-kiskunsági” stepo kaj lagoj, la lago ĉe „Izsák”, la sablomontetoj ĉe „Fülöpháza”, la kampoj de „Orgovány” kaj „Alpár”, kaj la plej fama estas la stepo de „Bugac”. En Bugac okazadas rajdantaj prezentadoj, kiuj logas la eksterlandajn gastojn. Post la prezentado ĉiuj gastoj rajtas gustumi la hungarecajn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn.
En la parko troveblas kelkaj interesaj kaj riĉaj protektaj regionoj, kiel Mártély, Ásotthalom kaj Pusztaszer. Multaj diversaj bestoj, floroj, birdoj kaj aliaj estaĵoj kaj kreskaĵoj estas sur la tuta teritorio. Kelkaj famaj lagoj troveblas tie, kiel la „Kunfehértó”, „Szelidi-tó” kaj la „Péteri-tó”.
En la nacia parko estas la interesa Nacia Historia Memorparko de Pusztraszer. La memorparko prezentas malnovajn loĝdomojn, meblojn, vestojn, ilojn kaj aliajn instrumentojn, eĉ la historion de Hungario ekde la fondaĵo de nia lando. Tie estas la plej interesa vidaĵo la prezentado de la granda rondpentraĵo, kiu prezentas la patrujokupon. Vidi tion estas neforgesebla travivaĵo.

„Bükki” Nacia Parko

Ĉi tiu nacia parko estas la tria parko en Hungario, kiun oni fondis en 1977. La parko troveblas en la nordhungaria teritorio, kaj enhavas dolomitajn kaj kalkŝtonajn montojn, kies specialaĵoj estas la ponoroj, interesaj rokoj kaj multaj malgrandaj grotoj kaj kavernoj. Ĝi havas 403 km^2 areojn. Sur sia blazono videblas karlino ĉirkaŭite de fagofolioj.
En la nacia parko troveblas la montaro „Bükk”, kies plej homogena parto estas la altplataĵo. La fizionomion de la altplataĵo determinas la karsto, kiu estas surfaca formo de kalkŝtona roko. Tial oni povas trovi multajn ponorojn, montosuprojn, valfaŭkojn kaj intermontajn fendegojn. En la parko estas pli ol 1100 grotoj, el kiuj 45 estas protektataj. Inter ili estas la groto „Bányász” kun 275 metroj profundeco, la grotoj „Anna” kaj „Sankta Stefano” en Lillafüred kaj la fama grotbanejo en „Miskolc-Tapolca”. Preskaŭ la tutan teritorion kovras arbaro. La plej multaj arbospecoj estas la fago kaj la

kverko arboj. Multaj raraj kreskaĵoj kaj bestoj troveblas en la parko. La faŭno de papilioj kaj insektoj estas unikaj.
Estas belega vidindaĵo en la nacia parko la kastelo de Lillafüred, kaj la tie trovebla akvofalo. El la urbo Miskolc arbara provinca fervojo trafikas laŭhorare tra Lillafüred al la karbistoj. La itinero de la fervojo kondukas apud la lago „Hámori", tra majeste belaj montoj, mallarĝaj valoj, ne tro longa tunelo kaj florriĉaj kampoj, pro kio la pasaĝeroj ege ĝuas la vojaĝon.

„Aggteleki" Nacia Parko

Oni fondis tiun parkon en 1985, do ĝi estas la kvara nacia parko en nia lando. Ĝi estas loko de la Natura Heredaĵo de Unesko en Hungario. Tiu nacia parko estas komuna kun la slovakoj, kaj troveblas en nordorienta Hungario. La karstsistemo geografie formas interrilatan komplekson, kaj ĝi havas 202 km^2 areojn, kie entute troveblas pli ol 900 grotoj, el kiuj 280 estas malfermitaj. La plej fama estas la „Baradla-Domica" groto, kiu estas 25 km-ojn longa. El tiu longeco la hungara parto havas 19,4 km-ojn. La grotoj donas unikan ekologian sistemon, kie pli ol 500 specoj da bestoj vivas. Inter ili la plej fama besto estas la makulhava salamandro, kiu estas amfibio el la ordo de urodeloj. Tiu besto videblas sur la blazono de la parko.
En la grotoj troveblas belegaj diversformaj kaj diverskoloraj stalaktitoj kaj stalagmitoj. La groto Baradla havas „Koncerthalon" kun bonega akustiko, kie en la jaro 1962 dum la 14-a IFEF-kongreso okazis memorinda koncerto por la kongresaj ekskursantoj. Pri tiu evento oni metis marmoran memortabulon sur la muron de la grotkoncerthalo, kiu estas sola memortabulo en la tuta groto kaj kiu ankaŭ nuntempe videblas.
En la parko troveblas multaj ponoroj kaj aliaj formiĝintaĵoj. La nacia parko protektas specialajn protektatajn valorojn. Krom la protektado de la estaĵoj kaj vegetaĵoj, la nacia parko devas konservi kaj subteni la tutan regionon, al kiu apartenas la popola arkitekturo, folkloro, industrihistoriaj valoroj, arkeologiaj trovaĵoj, kaj ĉiuj kulturhistoriaj valoraĵoj ktp. Per tiuj celoj la parkoj povas savi la koncernajn regionojn por la postepoko.

„Fertő-Hanság" Nacia Parko

En 1991 establigita kvina nacia parko estas la Fertő-Hanság Nacia Parko. Ĝi troveblas en la okcidenta Hungario. Sur la teritorio de tiu parko elformiĝis kaneja-marĉa regiono, kie multegaj protektataj birdospecoj vivas. Sur sia blazono videblas ardeo ĉe la lago „Fertő". La parko havas 236 km^2 areojn. El tiu areo apartenas al Hungario 130 km^2 , ĉar la parko etendiĝas ankaŭ en Aŭstrio. La parkon oni manifestis „Biosfera rezervejo".
La lago „Fertő" estas unu el la plej granda lago de Mezeŭropo. La surfaco de la lago estas pli granda ol la areo de la nacia parko. Tiu parto de la lago apartenas al Aŭstrio. La lago signife havas kanejon, kie multaj akvobirdoj trovas ĝustajn kaj konvenajn vivkondiĉojn. La vizitantoj trovas multspecajn kaj rarajn florojn ĉirkaŭ la lago.
La alia parto de la nacia parko estas la regiono „Hanság", kiun dividas en du partojn la ĉefkanalo „Hanság". Ankaŭ ĉi tie vivas multaj raraj kaj protektataj birdoj kaj floroj. Jam en 2001 komenciĝis la rehabilitado de la „Hanság" regiono.
La nacia parko havas kelkajn riverojn, kiel Rába, Répce, Duna kaj aliajn pli malgrandajn riverojn kaj riveretojn. Unu el la plej gravaj partoj de la parko estas la insulo „Szigetköz",

la arbaroj „Sopron” , la montetregiono „Pannonhalma” kaj la ebenaĵoj „Rábaköz” kaj „Répcemente”.
La kunlaboro de la du landoj (Aŭstrio kaj Hungario) estas fruktodona en la kadro de la agado de la nacia parko, kaj pro tio la evoluado de la parko estas kontinua.

„Duna-Dráva” Nacia Parko

Tiun parkon oni fondis en 1996, kaj ĝi estas la sesa nacia parko en Hungario. Ĝi troveblas en la suda parto de nia lando, kaj havas 495 km^2 areojn. Sur la teritorio de tiu parko troveblas la fama „gemenca” bestaro kaj la inundejaj arbaroj. Sur la blazono de tiu nacia parko videblas flugantaj akvobirdoj.
La surfaco de la parko estas montetaj, el kiuj altiĝas la montoj „Mecsek” kaj „Villány”. La plej interesa kaj protektata regiono estas la inundeja arbaro „Gemenc”, kiu havas 30 km-ajn longecojn, kaj 7 km-ajn larĝecojn. En tiu arbaro troveblas la „Ŝtata Arbara Malarĝŝpura Fervojo de Gemenc**.** Ĉi tie intermite trafikas nostalgia vaporlokomotiva trajno. Gemenc estas mondfama pro la cervo kun belega kaj altvalora korno, eĉ ĉi tie vivas multaj kapreoloj, aproj, kaj diversaj raraj kaj protektataj birdoj kiel la nigraj cikonioj, kampaj kaj aliaj agloj ktp.
Apud la rivero Dráva estas ebenaĵo, kiuj samtempe estas la inundareo de la rivero. Multaj diverspecaj fiŝoj, amfibioj kaj birdoj vivas kaj en la rivero, kaj en la inundareo. Entute kvin naturprotektaj distriktoj troveblas en ĉi tiu nacia parko. Sur la naturprotekta distrikto de tiu regiono estas la fama prajuniperaro ĉe la urbeto „Barcs”, kie trankvile vivas diversaj birdoj, serpentoj, libeloj. La alia konata teritorio estas la arbaro „Lankóczi”, kie multspecaj orkideoj, lilioj kaj aliaj protektataj floroj troveblas. En la teritorio de „Béda-Karapancsa” eksterordinaraj altvaloraj faŭno kaj flaŭro troveblas. Apud mortabranĉoj de la rivero Duna en grandegaj aroj vivas la akvobirdoj, lutroj. sovaĝaj katoj k.a.

„Körös-Maros” Nacia Parko

Oni fondis tiun parkon en 1977, kiu estas la sepa nacia parko en Hungario. La plej karakterizaj specialaĵoj de la parko estas la grandaj etendiĝaj inundejaj arbaroj kaj stepoj. La plej grava tasko de tiu nacia parko estas la protekto de la raraj kreskaĵoj kaj birdoj. Ĝi havas 501 km^2 areojn. Sur la blazono de la parko videblas la karakteriza birdo de la stepo, la granda otido „túzok”. Tiu parko troveblas sur la „Sudebenaĵo”, inter la riveroj „Tisza”, „Körös” kaj „Maros”.
En la parko estas multaj inundareoj, stepoj, fiŝlagoj, praherbejoj. Ĉi tie ankaŭ troveblas naturprotektaj teritorioj, kiel la arbareto „Szarvas”, la helika arbaro ĉe „Dénesmajor”, kaj la historia memorparko de „Szarvas”. En la stepo „Dévaványa” multaj diverspecaj birdoj vivas, kiuj tie restas dum vintroj. En la stepo „Cserebökény” multaj rabobirdoj troveblas, kiel la agloj, buteoj, strigoj k.a. La stepon „Csanád” jam en 1989 oni manifestis protekta teritorio, kie multspecaj raraj birdoj kaj insektoj vivas. En la stepo „Kígyós” la soda tero estas la dominanta, pro tio la vegetaĵo estas tute alia kiel en alia parto de la nacia parko. Kompreneble ankaŭ la faŭno estas varia. Grava estas la praherbejo de „Tatársánc”, kie oni trovis per elterigoj bronzepokan fortikaĵon.
Mi povas konstati, ke multaj diverspecaj kaj specialaj plantaĵoj, raraj floroj kaj birdoj, eĉ aliaj estaĵoj troveblas en la nacia parko. Ĝi havas grandan rolon en la birdo-migrado

ĉar la nombro de la sovaĝbirdoj estas 200-300 mil po aŭtuno, kiam ili alvenas en ĉi tiun nacian parkon.

„Balaton-felvidéki" Nacia Parko

Tiu parko estas la oka nacia parko en Hungario, kiun oni fondis en 1977. Ĝia tasko estas konservado de la unika faŭno kaj flaŭro de la lago „Balaton". Ĝi havas 570 km^2 areojn. Sur la blazono videblas rara primolo kun la konturo de la monto „Badacsony". La parko enhavas la tutan lagon Balaton, la nordan regionon de la lago. la „Malgrandan Balaton", kaj la regionon laŭ la rivero „Mura".
La plej impona kaj konata teritorio de la parko estas la duoninsulo „Tihany", kiu havas 16 km^2-ajn surfacojn. En la duoninsulo estas lageto, kie multaj birdoj nestas. Fama estas la abatejo, kiun multegaj eksterlandanoj vizitas ĉiujare. La alia fama teritorio estas la naturprotekta rondo „Badacsony". Al ĝi apartenas la montoj „Badacsony", „Szigliget", „Szentgyörgyhegy", „Csobánc", kiuj estiĝis per vulkanaj aktivecoj. Pro tio multaj raraj plantaĵoj kaj vinberĝardenoj troveblas sur la deklivoj de la montoj. Interesaj estas la kampo de „Kál" kaj „Pécsely", la altebenaĵo de „Keszthely". La Malgranda Balaton havas la plej mirindan birdparadizon de la lando.
La nacia parko ankoraŭ havas multajn famajn naturprotektajn teritoriojn. La plej fama estas la lago „Hévíz", pri kio mi jam detale skribis en la artikolo pri la kuracaj akvoj en Hungario. La aliaj famaj lokoj estas la kastelo „Festetics" kun belega parko en urbo „Keszthely", la arboreto en „Zirc", la grotlago ĉe „Tapolca", la sabla minejo en „Várpalota", la prakarsto en „Úrkút", la fiŝlagoj de „Sárosfő", la rokoj de la valo „Koloska" ĉe „Balatonfüred", la rivereto „Csigere" ĉe „Bakonygyepes", ktp. Mi povus denombri la vidindaĵojn en ĉi tiu riĉa kaj fama nacia parko, sed la spaco por la artikolo estas finita.

„Duna-Ipoly" Nacia Parko

La naŭan nacian parkon oni fondis en 1997. Tio estas la plej riĉa regiono de la faŭno kaj flaŭro, ĉar kelkaj bestoj kaj floroj nur ĉi tie troveblas en Hungario, eĉ en Eŭropo. La surfaco de tiu parko estas 603 km^2. Sur sia blazono videblas plej rara skarabo.
Valo, montaro, insulo, rivero: la valo „Ipoly", la montaro „Börzsöny", la insulo „Szentendre", la vojkurbiĝo „Duna" atendas la vizitantojn en ĉi tiu nacia parko.
Ĉi tie troveblas la grotoj „Pálvölgyi" kaj „Szemlőhegyi", en kiuj diversaj stalagtitoj kaj stalagmitoj plezurigas la vizitantojn, kaj videblas en ĉi tiuj grotoj praajn konkojn, kiuj lasis postsignojn sur la muroj. Fama estas la arboreto de „Alcsút", kiu havas 540 specajn arbojn kaj arbustojn.
La kulturpejzaĝo de „Ócsa" havas kanotegmentajn domojn, etnografian muzeon, en kiu multegajn malnovajn meblojn, vestaĵojn, uzantajn instrumentojn kaj ilojn povas ekkoni la vizitantoj. Kelkaj instruvojstrekoj konigas al la plej imponaj partoj de la parko, kaj prezentas la protektatajn kreskaĵojn kaj bestojn. Tiuj estas inter aliaj la instruvojstrekoj „Sashegy", „Nagyszénás", „Jág", „Strázsahegy", „Haraszthegy" k.a. Sur la teritorio de la nacia parko eksterordinare multaj protektataj floroj kaj aliaj kreskaĵoj troveblas, kaj ĝi enhavas kelkajn famajn urbojn (Visegrád, Szentendre, Esztergom, Vác, Székesfehérvár k.a.) kun valoraj postrestaĵoj, artobjektoj kaj popolaj tradicioj, lagojn (Velence,

Délegyháza, Biatorbágy k.a.) kun nenombreblaj somer-domoj kaj banlokoj, birdoj kaj fiŝoj.
En la montaro Börzsöny trafikas du arbaraj mallarĝŝpuraj fervojoj, per kiuj ĉefe turistoj povas veturi al la plej belaj partoj de la montaro. Mi devas mencii ankaŭ la infanfervojon en la montaro „Buda", kiu laŭhorare trafikas dum la tuta jaro.

„Őrségi" Nacia Parko

La lastan nacian parkon oni fondis en 2002. La parko etendiĝas en la okcidenta parto de Hungario, kie la popolaj tradicioj kaj moroj ĝis nun senŝanĝe konserviĝas kaj postvivas. La parko havas 440 km^2 areojn. La parko estas monteta- kaj montara regiono, kiun la riveroj kaj riveretoj formigis al la nuna formo. Multaj pinarbaroj, kverkoj, alnoboskoj, marĉoj kaj herbokampoj karakterizas tiun parkon. Ĉi tie troveblas diverspecaj raraj papilioj kaj libeloj. Pro tio sur la blazono de la parko videblas papilio.
Al la parko apartenas la regiono „Őrség", kie belegaj arbaroj, florpompaj herbokampoj atendas la vizitantojn. Multaj kulturhistoriaj valoraĵoj, „jupaj" lignaj sonorilejoj, dikmuraj preĝejoj el la epoko „Árpád" montras la interesaĵon de tiu regiono. La malgrandaj domaj lagetoj („tóka"), pajlotegmentaj domoj, diverspecaj floroj kiel la ciklameno kaj primolo, multaj bestoj, kiel la vulpo, leporo, cervo, kapreolo, apro kaj aliaj bestoj, multkoloraj birdoj kaj insektoj, kaj ĉefe trankvileco, silento donas la ĉarmon de tiu vere belega regiono.
Kelkaj muzeoj (Sághegyi, Őrségi k.a.) prezentas la naturan kaj kulturhistorian valorojn de tiu nacia parko. Ankoraŭ videblas tie minejoj, vinberkulturo kaj potfarista arto. En urbo „Kőszeg" ekzistas birdoprotekta modelloĝigejo, kie oni sanigas la difektitajn birdojn. Ĉi tie troveblas pli ol 200 specaj arboj, inter tiuj la rara ĉina lariko.



Grizbovoj en Hortobágy

Kompreneble ĉiujn informojn, indikojn, spertojn kaj konojn mi ne povas priskribi, ĉar la spaco por ĉi tiu artikolo estas limigita. Mi nur povas konigi pri la naciaj parkoj la plej gravajn kaj interesajn faktojn.
En la sekva numero de HFM mi ŝatus prezenti la sep establitajn hungarajn naturparkojn. La natura parko estas kunlaborado inter la lokaj komunumoj por savi kaj protekti la naturajn kaj kulturajn heredaĵojn.

(Fonto: Vikipedio)

István Gulyás

Ligna sonorilejo en la „Őrségi” Nacia Parko

La 69-a kongreso de IFEF okazos de la 16-a ĝis la 23-a de majo 2017 en Francio, Alzaco, en la urbo Colmar. Informojn kaj aliĝilojn oni povas ricevi de HFEA.